Eklezio kaj eklezioj : unueco kaj unuiĝoj

Ekumena kongreso, Poděbrady, 2018

En la unua epistolo de la apostolo Paŭlo al la Korintanoj, unua ĉapitro, ekde la versiklo 10 :

> *Mi petegas vin, fratoj, per la nomo de nia Sinjoro Jesuo Kristo, ke vi ĉiuj parolu tion saman, kaj ke estu neniaj skismoj inter vi; sed ke vi estu perfekte kunigitaj en la sama spirito kaj en la sama juĝo.*
> *Ĉar pri vi, miaj fratoj, estas sciigite al mi de la domanoj de Ĥloe, ke ekzistas inter vi malpacoj.*
> *Kaj la jenon mi volas diri, ke ĉiu el vi diras: Mi estas de Paŭlo; kaj mi de Apolos; kaj mi de Kefas; kaj mi de Kristo. Ĉu Kristo estas dividita? ĉu Paŭlo krucumiĝis por vi? aŭ ĉu vi baptiĝis en la nomon de Paŭlo?*

Aŭ en Galatoj, 3:28 : *Vi ĉiuj estas unu en Kristo Jesuo.*
Aŭ ankoraŭ la preĝo de la Sinjoro en Johano 17:21 : *Kaj mi preĝas ne nur por ili, sed ankaŭ por tiuj, kiuj kredos al mi pro ilia vorto; por ke ili ĉiuj estu unu; kiel Vi, Patro, estas en mi, kaj mi en Vi, tiel ili ankaŭ estu en ni; por ke la mondo kredu, ke Vi min sendis.*

Tiujn tekstojn oni povas legi dumaniere : ĝi priskribas la Eklezion kiel ĝi estas aŭ kiel ĝi devus esti.
La respondo al tiu dilemo dependas de la difino, kiun oni donas al la vorto Eklezio mem.
Ĉar tra historio kaj konfesioj oni povas trovi diversajn difinojn de la Eklezio.
La tradicia Reformacia difino, kiu estis tiu de Luther kaj ankaŭ de Kalvino estas : « *La Eklezio estas la kuniĝo de la sanktuloj en kiu la Evangelio estas pure instruata kaj la sakramentoj regule administrataj* »
Por la evangelika parto de protestantismo, la Eklezio estas la kuniĝo de tiuj kredantoj kiuj estas fidelaj al la Biblio kiel lasta aŭtoritato.
Tamen, ambaŭ diras samtempe, ke ne eblas efektive koni la limojn de la Eklezio, kaj parolas pri la nevidebla universala Eklezio.
Por katolika aŭ ortodoksa kristanismoj, la Eklezio estas difinita per la apostola sinsekvo de la episkopoj, sed krome ligite kun la aliaj episkopoj kaj koncilioj. Al tio, la katolikoj aldonas la neceson estis ligata al la Roma sidejo.
Kelkaj protestantaj eklezioj konservis tiun sinsekvon de episkopoj, sen la ligo al Romo kompreneble.

Kompreneble, ĉiu difino havas siajn limojn. Kio estas pure instruata evangelio kaj regule administrataj sakramentoj ? Kiamaniere oni legas la Biblion ? Kiel ĝin interpreti ? Ĉu vere la sinsekvo de la episkopoj estis seninterrompa ? Ni scias ke ne. Eĉ nek por la Roma sidejo. Kiujn konciliojn agnoski ? Ne ĉiuj konsentas. Kvankam referencaj, tiuj ĉi difinoj ne sufiĉas.

Kaj ankaŭ ĉiuj ekleziaj familioj havas komunajn trajtojn. Kaj tio estas tamen logika. Por tio komuna, la Eklezio estas unu.

En la protestanta historio oni povas rapide konstati ke ne ĉio glatas. Estis kaj malakordoj kaj konkordoj, sinsekve kaj samtempe.
Mi citos kelkajn ekzemplojn en la 16a jarcento kaj poste en la 20a.
En 1529 okazis la Kolokvo de Marburg kiu kunigis preskaŭ ĉiuj reformatoroj. Oni tamen devas noti ke ne ĉeestis la anabaptistoj. La partoprenintoj konsentis pri preskaŭ ĉio krom pri la Sankta Manĝo. Zwingli, kiel formulis la holanda Honius, rifuzas la "enpanigon" de Kristo. El la 15 punktoj de la fina teksto, 14 estis konsentoj kaj unu, ĝuste pri la Sankta Manĝo, konstatis la malkonsenton. Oni atribuas al Luther la diron : "Ni ne havas la saman spiriton".

Ene de luteranismo okazis jam en la komenco pluraj kvereloj, elzemple pri la rolo de la leĝo. Tiuj solviĝis en 1577 per la formulo de Konkordo kaj en 1580 en la libro de konkordo.

Estis pluraj problemoj inter Ĝenevo kaj Zuriko, do ene de la "reformita" familio, ĉefe denove pri la Sankta Manĝo. Kalvino kaj Bullinger, posteulo de Zwingli, alvenis al konsento en 1555, kiun eĉ komprenis Melanchton. Tio estas la Konsento Zurika (Consensus Tigurinus) kiu unuigis la familion.

En la posta periodo dum kelkaj jarcentoj okazis teologia streĉiĝo ene de la diversaj konfesiaj familioj. Reage al tiu fenomeno naskiĝis diversaj movadoj, kiel pietismo, liberalismo, vekiĝoj.
Kaj alvenis fine de evoluo la 20a jarcento kun la apero de ekumenismo, la reciproka aŭskultado, multaj personaj renkontiĝoj.
Inter la rezulto de tiu evoluo estas ekzemple la konkordo de Leuenberg en 1973, kiu arigas luteranaj, reformitaj kaj poste metodistaj eklezioj, per kiu ili agnsokas dividi la saman fidon kaj deklaras inter si plenan komunion. Oni nun insistas pri tio kio kunigas kiam en la 16a jarcento oni insistis pri tio kio disigas. Estas ankaŭ tekstoj de reciproka agnosko kaj de komunio, inter anglikanoj kaj luteranoj, reformitoj, metodistoj. Tio signifas ke servanto, pastoro de unu el tiuj eklezioj povas senprobleme deĵori en alian, ke ili partoprenas en la Sankta Manĝo de la alia.
Tamen, en ĉiuj ĉi tiuj diskutoj, disputoj, konkordoj kaj malakordoj, oni ĉiam trovas kriterion, kiu estas la distingilo de protestantismo, nome la Sanktaj Skriboj. Argumentoj por disiĝi aŭ por kuniĝi estis ĉiam prenitaj en la Biblio.

En tio helpis la grava protestanta nocio : la universala Eklezio.
En sia ĵusa Deklaro de fido (2017) la Franca Unuiĝinta Protestanta Eklezio diras ke ĝi "estas unu el la vizaĝoj de la unu Eklezio de Kristo".
La universala Eklezio "konsistas el la aro de la kredantoj, de la instruantoj, de la aŭskultantoj, tiuj nuntempaj, pasintaj kaj estontaj."
Tiun eklezion oni distingu de la loka komunumo, "la Eklezio kiu estas en…" kiel oni ofte trovas en la Nova Testamento. Same, oni distingu de la nacia aŭ regiona eklezio, kiu estas la kuniĝo de lokaj eklezioj.
Sekve neniu protestanta eklezio diras ke ĝi estas LA Eklezio. Tio logike kondukas al deziro de manifestiĝo de tiu unueco de la Eklezio, ĉar tiel ĝi estas. Kristo ne estas dividita sed la kristanoj disŝiris la korpon en pecoj laŭŝajne. Estas la respondeco de la gvidantoj ke la unueco de la Eklezio estu videbla.

Tamen, oni konstatas ke disvolviĝis eklezioj ne nur laŭ loka aŭ regiona aŭ nacia kadro, sed ankaŭ laŭ konfesia kadro. Kaj ofte la rilatoj estas akraj.
Estis do streboj de kelkaj ne nur manifesti la unuecon de la korpo de Kristo per reciproka agnosko kaj per kunlaboro, sed ankaŭ per instituciaj unuecoj.

La kokokvon de Marburg instigis unu el la germanaj princoj pro la milita situacio. Li deziris ĉefe pro politiko la unuecon de la reformatoroj, bedaŭrinde kun duona sukceso.

Alia princo volis kaj devige efektivigis unuiĝon inter reformitoj (kiel li) kaj luteranoj (kiel lia popolo). Temas pri eksa Brandenburgo kiu fariĝis Pruslando. En tiu germana princlando la princo estis reformito kaj la plimulto de la loĝantaro luteranoj, kun la notinda escepto de la rifuĝintoj.  En 1798 Frederiko Vilhelmo 3-a fariĝis reĝo. Li strebis al la unuiĝo de la protestantoj en siaj teritorioj. La teologo Frederiko Schleiermacher proponis ideojn por konstitucio de tiu eklezio en 1808 kaj la reĝo fine de 1817 estigis la novan eklezion. Sed ne ĉiuj paroĥoj eniris la novan unuiĝintan eklezion, sekve poste kiel oni ofte vidos en aliaj samaj cirkonstancoj anstataŭ du eklezioj estis tri. La afero ne okazis en pacaj kondiĉoj.
Same unuiĝis la eklezioj en kelkaj aliaj germanaj ŝtatoj kaj regionoj.

Samtipaj unuiĝoj okazis ekde fino de la 19-a jarcento en aliaj landoj sed sen interveno de la ŝtatoj, kiel ekzemple en 1918 (antaŭ unu jarcento) en Ĉeĥio, konsistigante la Evangelian Eklezion de la Ĉeĥaj

Fratoj. Antaŭnelonge en la fluo lanĉita de la konkordo de Leuenberg okazis tiaj unuiĝoj en Nederlando post la procezo "Kune sur la vojo", en Belgio, en Francio (2013).

Tute alia tipo de unuiĝo de protestantaj eklezioj instige de la ŝtato okazis en la 20-a jarcento dum la diktaturo de Mobutu en Zairio, kie ĉiuj protestantaj komunumoj devis ariĝi por konsistigi la Eklezion de Kristo en Zairio. Kiam finis la diktaturon de Mobutu ne ĉesis tiu unuiĝinta eklezio sed daŭris en posta laŭnome demokrata Kongio. La samo okazis pli frue en Japanio dum la militista reĝimo kaj same daŭris post la malvenko kaj la alveno de demokratio.

Dua kategorio estas la unuiĝoj en la daŭro de la 20-a jarcento de, laŭ la kazoj, presbiterianaj, kongregaciaj, metodistaj, "disĉiploj" aŭ aliaj "liberaj" eklezioj en Britio, Aŭstralio, Kanado (unua en 1925) aŭ Usono. Se ne ekzakte el la sama konfesia familio, tiuj eklezioj estas teologie proksimaj.

Kiam en tiuj unuiĝoj enestas anglikanoj, tiam oni parolas pri kvara kategorio, ĉar tiam ĝenerale konserviĝas la episkopa sistemo de la anglikanoj : Suda Hindujo 1947 (la procezo komenciĝis en 1908), Norda Hindujo 1970.

Fine estas kvina kategorio kiam la unuiĝintaj eklezioj kunigas denominaciojn el la sama konfesio (reformita-presbiteriana aŭ luterana) kiuj estis disaj pro historiaj kaŭzoj. Tiu situacio estas ofta en Usono kie okazis disiĝoj sed ankaŭ dividoj laŭ etnaj devenoj.

En kelkaj kazoj, tiuj unuiĝintaj eklezioj asertas ke la procezo ne finiĝis. Tial ili nomas sin "unuiĝantaj" eklezioj, esperante aligi aliajn komunumojn, ekzemple en Aŭstralio.

Ĝenerale la unuiĝintaj eklezioj konservas la ligojn kun la diversaj konfesiaj mondaj organizaĵoj.

Mi jam parolis plurfoje pri Leuenberg. Tie efektiviĝis alia tipo de unueco, nome la "eklezioj en komunio". La subskribintaj eklezioj konsistigis ekde 2003 komunumon aŭ komunion laŭ la lingvoj. Tio havas fortan signifon. Ili ne konsistigas ĝustasence unu eklezion, sed agnoskas ĉe la aliaj ĉiuj trajtojn kiuj karakterizas parton de la unu Eklezio. Tio kompreneble ne estas indiko ke ekster ili ne troviĝas parto de la unu Eklezio. Inter samspecaj akordiĝoj estas tiu de Bonn 1931 inter anglikanoj kaj malnov-katolikoj kaj tiu de Porvoo 1992 inter anglikanoj kaj skandinavaj luteranoj, por ne paroli pri Meissen 1988 kaj Reuilly 2001.

Unuiĝoj, komunioj, konkordoj estas maniero diri, manifesti la unuecon de la Eklezio de Kristo. Tamen, tio estas nek la celo, nek la fino de la unuecigo de la Eklezio.
Ĝis nun la vidpunkto estas konfesia, institucia, dogma.

Disvolviĝas pli kaj pli, kaj tio havas jam pli forajn radikojn, la post-konfesia kristanismo.
Jam de longe la teologoj de la diversaj ekleziaj akademiaj institucioj laboras kune, tiel ke ofte en konferencoj estas malfacile diveni la konfesion de la preleganto. La ekzegeza esploro trapasas la konfesiojn. Laborgrupoj kiel la Grupo de Dombes en Francio notinde ekzemplas.
La diakonia aŭ karitata laboro ne atentas pri la doktrinaj limoj kaj postas la amon de Dio al la mondo sen distingoj.
La spirita vivo, la preĝgrupoj kaj preĝkomunumoj pli kaj pli preterpasas la konfesiajn kadrojn, kun ekzemploj de Taizé aŭ de la Nova Vojo (Chemin neuf) aŭ de la skota komunumo de Iona.
En multaj landoj ne historie kristanaj, la konfesioj historiaj ne plu validas. En la Misia konferenco de Edinburgo en 1910, origino de la ekumena movado, unu el la rimarkitaj prelegantoj estis unu ĉino kiu laŭdis la trejnajn instituciojn interkonfesiajn. Kaj nun en Ĉinio, iu kristano plejofte ne havas alian konfesion ol kristanismo. Parenteze, en Ĉinio, same en Koreio kaj Japanio, kiam oni parolas pri "kristano", oni unue pensas pri la protestantoj. La katolikoj etas la katolikoj. Inverse ekzemple en Francio.

Ĉirkaŭ la mondo aperas novaj lokaj eklezioj ekster la konfesia pejzaĝo. Gravas por ili la proklamo de la Evangelio. Ili ankaŭ konsistigas parton de la unu Eklezio, sed konfesia nomo sur la ŝildo, krom Kristo. Plia kazo de malapero de la konfesiaj limoj troviĝas en la ĥarisma movado, kiu trapenetris preskaŭ ĉiujn konfesiojn. Foje, ĝi eĉ perdis sian signifon kiam estis ŝanĝita la nomo, kaj ne nur la nomo sed la spirito, al Ĥarisma renoviĝo kaj simple al Renoviĝo.

Alia fenomeno estas tiu de la "aperanta eklezio" (emerging church, église émergente) kiu manifestiĝas en la diversaj eklezioj kaj apud ili, kiu sin turnas al la samtempanoj por atesti pri la Evangelio per novaj rimedoj, eltrovoj por kontakti, agi, evangelizi. Tiu "nova evangelizo" okazas ankaŭ inter protestantoj delonge kaj pli kaj pli disvolviĝas. Notinda estas kio okazis en Britio, unue ĉe la anglikanoj kaj poste disvastiĝis.
La nuna konvertiĝo al kristanismo ne plu estas konvertiĝo al tiu aŭ tiu eklezio, sed firme al la Evangelio de Kristo, sperto de renkontiĝo kun Kristo. Pli kaj pli validas la vortludoj ĉirkaŭ anglalingva formulo "believing and belonging" kredo kaj aparteno. Kio gravas estas kredo al Kristo tra persona sperto. Kalvino parolus pri la "interna atesto de la Spirito". Kio gravas estas aparteno al la familio de Kristo, al la kredantoj, al la unu Eklezio. Sed ne gravas kredo al dogmoj. Ne gravas aparteno al iu konfesia familio. Oni iras tie kie oni sentas sin akceptita, edifita, partoprenanta, sendepende de doktrinoj.

Por fini mi volas citi la konkludon de artikolo mia kiu aperis en Dia Regno kaj kiun mi larĝe uzis :
En nia eta esperantista kristana movado estis kelkaj konfesiaj ligoj, sed mi estas feliĉa ke nia KELI estas de la komenco "unuiĝinta" kristana asocio. Por ni, Kristo kaj la Skriboj estas nia komuna fundamento, preter niaj diversaj sentoj kaj travivaĵoj.

Kaj mi aldonas tiun diron, kiu relative bone priskribas la konfesian situacion : Katolikismo : tre diversaj familioj en unu domo. Protestantismo : unu familio en tre diversaj domoj.

Mi kore dankas.